

Ĉu estas homoj rezistaj al aidoso?



Kunlaboranto de MONATO denove libera


La kukurbo -
frukto multvizaĝa

Turismo en Nagasako

Aperis du noveloj de la afrika aŭtoro Jean Codjo:



La paŝo senelirejen: La unua verko de Jean Codjo, kiu rakontas la unuan kontakton de sia vilaĝo kun la okcidentaj kulturigontoj ... Neteoria trakto, tamen tre inspira!



Dialogo inter surduloj: Dua verko de la benina aŭtoro, pri la malfacileco de komunikado inter kulturoj. Civilizita nigra blankulo prelegas, sub la baobabo, al siaj samtribanoj. Ili aŭskultas sed ne aŭdas ...

Prezo: po 6 eŭroj + afranko.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendisto.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Surrealismo, surrealismo

11

Monato-kunlaboranto Petro Desmet' estis en la malliberejo de Dendermonde. Li estis enkarcerigita sub suspekto, ke antaŭ pli ol 10 jaroj li sekse atencis tiam ankoraŭ ne adoltan knabinon. Lia procezo, kiu difinos, ĉu la ŝtato konsideras lin kulpa aŭ ne, okazos nur post kelkaj monatoj. El la malliberejo li sendis al Monato kelkajn leterojn.



La kukurbo - frukto multvizaĝa

14

Oktobro estas la monato de la kukurboj kaj de la kukurbfestoj, ankaŭ en Orienta Stirio, parto de Aŭstrio. Ĉie oni rikoltas, senkernigas, ĉizas kaj manĝas la globoformajn fruktojn, kiuj botanike estas parencaj al la beroj.



Nagasaki

Nagasaki estas ĉefurbo de la samnoma prefektujo sur la sud-japana insulo Kiuŝuo. En la urbo loĝas 420 000 loĝantoj kaj ĝi lastatempe estiĝis turisma loko, kiu allogas multajn vizitantojn.



16

Ĉu estas homoj rezistaj al aidoso?

19

En la mondo daŭras la senbrida kaj furioza disvastiĝo de aidoso. La ununura absoluta garantio kontraŭ malsaniĝo dume restas la preventado de infekto. Sed nuntempe kuracistoj atentigas kvazaŭ ne egalan susceptivecon de diversaj homoj al la viruso de aidoso. Estas unuopaj homoj, kiuj dum multaj jaroj ne infektiĝas, malgraŭ multenombraj seksaj kontaktoj kun HIV-infektitoj. Lastatempe sciencistoj esploras iujn internajn mekanismojn, kiuj povas klarigi la relativan rezistecon de iuj personoj al aidoso.

politiko

Slovenio	8
Muso kaj elefantaro	
Milito kaj paco	8
Eŭropa Unio	9
Historia momento	
Balkanio	10
Vizo-krizo	

moderna vivo

Letero el la karcerio	11
Surrealismo, surrealismo	
Pentroarto	13
Nuboj-duboj	
Litovio	13
Mispaŝe	
Kuirarto	14
La kukurbo - frukto multvizaĝa	

turismo

Japanio	16
Nagasaki	

scienco

Malsanoj	19
Ĉu estas homoj rezistaj al aidoso?	

hobio

Finnlando	20
Nordiaj rozoj	

eseo

Sidante en pudingo, mi alvokas miajn savantojn!	21
---	----

libroj

Mallumo en bengala nokto	24
Poplarsciencaj kaj socikritikaj artikoloj	25

spirita vivo

Ne persekutu la hebreojn	26
--------------------------------	----

› Abonoj	4
› Enkonduko	5
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	27

► Rekto al la eldonejo ...

- Per via FEL-konto.
- Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- El Usono per ordinara usona ĉeko.
- Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- Per internaciaj respondkuponoj. Unu kupono nur maldekstre stampita valoras 0,75 EUR.
- Per bankĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto	MONATO			La JARO aere	
	surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	23	27	13,8	5 9
Aŭstralio	AUD	82	90	49,2	9 17
Aŭstrio	EUR	49	53	27,6	5 9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5 9
Brazilo	EUR	23	27	13,8	5 9
Britio	GBP	34	37	20,4	4 6,5
Bulgario	EUR	25	29	15	5 9
Ĉeĥio	EUR	33	37	19,8	5 9
Danio	DKK	365	395	219	40 70
Estonio	EUR	25	29	15	5 9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Francio	EUR	49	53	29,4	5 9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5 9
Germanio (or.)	EUR	45	49	27	5 9
Grekio	EUR	45	49	27	5 9
Hispanio	EUR	45	49	27	5 9
Honkongo	EUR	41	45	24,6	5 9
Hungario	EUR	25	29	15	5 9
Irlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Islando	EUR	49	53	29,4	5 9
Israelo	EUR	41	45	24,6	5 9
Italio	EUR	49	53	29,4	5 9
Japanio	JPY	7900	8500	4740	860 1460
Kanado	CAD	73	78	43,8	9 15
Kipro	EUR	33	37	19,8	5 9
Koreio	EUR	41	45	24,6	5 9
Kostariko	EUR	23	27	13,8	5 9
Kroatio	EUR	25	29	15	5 9
Latvio	EUR	25	29	15	5 9
Litovio	EUR	25	29	15	5 9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5 9
Malto	EUR	33	37	19,8	5 9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5 9
Norvegio	NOK	390	430	234	45 71
Nov-Zelando	NZD	95	103	57	10 18
Pollando	PLZ	99	110	59,4	22 36
Portugalia	EUR	41	45	24,6	5 9
Rusio	EUR	23	27	13,8	5 9
Singapuro	EUR	41	45	24,6	5 9
Slovakio	EUR	25	29	15	5 9
Slovenio	EUR	33	37	19,8	5 9
Sud-Afriko	EUR	41	45	24,6	5 9
Svedio	SEK	460	495	276	49 84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9 15
Tajvano	EUR	41	45	24,6	5 9
Usono	USD	69	75	41,4	8 13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5 9

► aŭ pere de peranto ...

- **Aŭstralio:** Libro servo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson Str. 2016 Redfern. Reto: libro servo@esperanto.org.au.
- **Aŭstria:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- **Brazila:** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasília. Reto: bel@esperanto.org.br.
- **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- **Dana:** Revusero de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoficejo@esperanto.fi.
- **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- **Germanaj:**
 - Literatura-Servo "Espero", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, D-27333 Schwering (Volksbank Grafschaft Hoya eG, Konto-numero: 0 705 447 500, BGN: 256 635 84). Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigschafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzer@tiscalinet.de.
- **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsi. 1/3 III. 1. Reto: abonasoft@gmail.com.
- **Irana:** Irana Esperanto-Centro, P.O. Kesto 17765-184, Tehran.
- **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.

- **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca.
- **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08200 Sabadell (Caixa de Pensions 2100-0461-90-0200055053). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601 ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860 Rete: esperanto@saluton.net.
- **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miamiau1@ice.co.cr.
- **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: mbelosev@public.srce.hr.
- **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecības 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- **Litova:** Laimius Stražnickas, Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: Luksemburgo 8936-12). Reto: esper_lu@geocities.com.
- **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gddewar@ihug.co.nz.
- **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- **Ruslandaj:**
 - Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zeiric@eunet.yu.
 - **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
 - **Svedaj:**
 - Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com.
 - Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: beritl.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org.



Enkarcerigo

por definitive enkarcerigi ilin. „Vi,” diras la gazeto „vi povus esti la sekvonta, kiu estos arestita. Bone konservu la sakon. Eble vi bezonos ĝin baldaŭ.”

Ĉu troigo? Ankaŭ mi verŝajne pensus tion, se en la pasintaj semajnoj mi ne estus estinta en preskaŭ konstanta skriba kontakto kun persono, kiu troviĝis en la malliberejo sub suspekto, ke antaŭ pli ol 10 jaroj li sekse atencis iun tiam ankoraŭ ne adoltan fraŭlinon. Li ĵuras, ke li estas senkulpa, kaj ĝis nun neniu magistrato povis pruvi la malon. „Kaj tiel longe ke juĝisto ne verdiktas pri ies kulpo, oni supozu lin senkulpa” diras artikolo 6 paragrafo 2 de la Eŭropa Traktato pri la Homaj Rajtoj. Tamen, malgraŭ homaj rajtoj, li estis en karcero dum 6 semajnoj kaj sub ne tre facilaj cirkonstancoj.

Dum la unuaj semajnoj gardisto kontrolas la ĉelon de la suspektatoj ĉiun dekan minuton por konstati, ĉu li aŭ ŝi ne provas mortigi sin. Tio ĉi okazas ankaŭ nokte, ĉiun dekan minuton, per

mallonga enŝaltado de la lumo. Ĉu ne ekzistus pli home dignaj kontrolmanieroj? Suspektato ja havas ankaŭ rajtojn. Li ekzemple rajtas vidi sian dosieron, do ekscii, kial oni kulpigas lin. Sed „vidi” oni interpretu tre strikte. Suspektato en Belgio povas vidi sian dosieron, sed li ne rajtas fari iajn notojn.

La viron, pri kiu temas tie ĉi, vi eble konas. Li jen kaj jen verkas por MONATO, ankaŭ ĉi-numere. Li ne havas kialon por prisilenti la fakton, ke li estis enkarcerigita. Li ja deklaras sin senkulpa. Temas pri Petro Desmet', konata lingvisto kaj vortaristo, ŝatata muzikisto, ne nur en la Esperanto-mondo, sed ankaŭ loke. En tiu ĉi numero MONATO publikigas leteron lian el la malliberejo kaj humuran, sed tamen fundan eseon pri la vorto „pudingo”. Bonan legadon!

Paŭl PEERAERTS



www.monato.net

MONATO, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; monata revuo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 29a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukaĵoj); represo kaj tradukaĵoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendo ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anonc-tarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.

Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hector Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts. Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Joan-Ferriol Masip i Bonet.

redaktoroj:

- **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.
- **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redakto-ro, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Auslands-presse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ. Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** Monato, Frankrijklee 140, 2000 Antwerpen, Belgio. Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 2487 N Taylor Rd, Apartment 11, Cleveland Heights, OH 44118, Usono. Telefono/faksilo (216) 297-0370. Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librocenzoroj oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koi-gakubo 3-18-12 Kokubunzi-si, 185-0014 Tokio, Japanio. Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklee 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congle-

ton, Cheshire, Britio. Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** Nicola Ruggiero, via Trento, 59 I-70042 Mola di Bari (BA). Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio. Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono. Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kal-verstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando. Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** Grigorij L. Arosev, a/a 5, RUS-127224 Moskva, Ruslando. Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Auslands-presse, Bankgasse 8, A-1010 Wien, Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.



La plej nova novelaro de Lena Karpunina

Neokazinta amo

kun 15 novaj rakontoj, inter kiuj kelkaj estis premiitaj.



Legintoj skribas:

“Se mi estus leginta nur unu rakonton de Lena Karpunina, mi povus konvinke aserti: la juna verkistino estas vere talenta. En stilo klara, laŭ bona tradicio de la rusa literaturo, la rakontoj pliriĉigas niajn mensojn, plibonigas niajn korojn.”



(Ignat Florian Bociort)

“Ŝia majstra talento verkista konsistas ĉefe el homa psikologio kaj kapablo prezenti eĉ la plej strangajn personojn tiel, ke la leganto akceptas kaj eĉ ekŝatas ilin. En la Esperanta literaturo tiu ŝia talento estas vere malofta.”



(Sten Johansson)

Prezo: 15 eŭroj + afranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo aŭ ĉe via kutima vendanto.

- ISBN: 90-77066-28-7
- Paĝoj: 150
- Serio Stafeto n-ro: 31

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be

Fido kaj skeptiko

de Stefan MAUL

Ĉu ankaŭ vin ĉagrenas la ekscesa misuzado de interreto? Uzurpis ĝin jam delonge krimuloj ĉiuspecaj (nelaste teroristoj), trompuloj kaj reklamistoj, kiuj plenstopas niajn elektronikajn poŝtkestojn, proponante gigantajn mongajnojn aŭ miraklajn medikamentojn. Multaj homoj, kiuj uzas ret-servojn de bankoj, devis sperti bankrotiĝon, ĉar oni elspionis iliajn kontojn kaj forĝiris la tutan bonhavan. La polico devis instali kaj konstante pligrandigi specialajn komisionojn por persekuti ret-krimojn, de infan-porno-grafio ĝis ekonomia trompado.

Facile trovi

Pli nova maniero misuzi la reton estas manipuli tekstojn en libere alireblaj enciklopedioj, ekzemple Wikipedia (ne Vikipedio, la Esperanto-versio!). Origine sendube estis bona ideo, kompili por mondvasta uzado tian senpagan elektronikan servon. Se oni serĉas informojn pri iu ajn temo, preskaŭ ĉiam oni trovas ilin tie. Laste nepino mia havis la taskon, por lernejo prepari referaĵon pri inventado de telefono. Niaj ordinaraj leksikonoj prezentis nur malmultajn indikojn, do ni serĉis helpe de Google (Guglo) en interreto – kaj jen, en Wikipedia aperis ampleksaj tekstoj kun pluraj interesaj fotoj. Sed, ho ve! La artikoloj estis verkitaj sufiĉe konfuze kaj haose, tiel ke estis malfacile eltiri la necesajn informojn kaj faktojn. Tradicia enciklopediisto certe hontus pri tiaj tekstoj ... Krome, kiel ni kontrolu, ĉu la enhavo estas ĝusta? Ankaŭ por tio ne sufiĉis niaj informlibroj.

Ĉiuj ŝajne fidis al Guglo kaj Wikipedia, intertempe ankaŭ ĵurnalistoj. Dum

kongreso de germanaj ĵurnalistoj juna redaktorino serioze demandis pli aĝan kolegon: „Kiel do vi reserĉadis antaŭ ol ekzistis Guglo?” Ni junaj ĵurnalistoj lernis, ke neniam ni fidu al nur unu fonto, ankaŭ ne nepre al enciklopedio, ĉar ankaŭ en ĝi povas aperi eraraj aŭ nesufiĉaj informoj. Ĉiu el ni povas testi tion, kontrolante kion tia verko skribas pri Esperanto ... Certe, ofte ankaŭ en pasinteco ĵurnalistoj pekis, citante nur unu fonton, sed nuntempe en amaskomunikiloj gravas ne plu fideindeco, sed rapideco. Do oni guglas kaj tuj pludonas trovitan informon, ne kontrolante ĝin.

Misfamigo kaj kalumnio

Kiam temas pri ordinaraj aŭ eĉ bagatelaj aferoj, oni povas ridi pri tioma naiveco, sed okazas ankaŭ, ke tiamaniere oni misfamigas aŭ kalumnias homojn. Drasta ekzemplo pri tia misago estis manipulo de la reto fare de anonimulo, kiu nomis sin „Tonay”. Li distruptis mensogojn pri Bilawal Bhutto Zardari, filo de la murdita pakistana eksĉefministro Benazir Bhutto. Sub lia nomo en Facebook li skribis falsajn asertojn, kaj grandaj britaj, kanadaj kaj aŭstraliaj gazetoj simple transprenis tiujn „informojn”, ĝis la servo Facebook riglis la falsajn.

Biografioj en interreto estas tre ŝatata kampo de falsantoj, ne malofte koncernatoj mem verkas (legu: manipulas) siajn biografiojn. En la okazo de Bhutto oni supozis interalie, ke intervenis la pakistana sekreta servo. Tia supozo ne estas senbaza, ĉar oni scias, ke en multaj ŝtatoj oni faras tion. Konate estas, ke usonaj registaraj instancoj misinformis la publikon pri la Irak-milito.



JOE ANDY MENDOZA

Fenomeno ne nova

La fenomeno tamen ne estas nova; ankaŭ antaŭ apero de interreto oni manipulis. Krome historiistoj kaj ĵurnalistoj tradicie estas plej fervoraj kopiantoj kaj plagiatantoj. Ili simple transprenas asertojn de aliaj, kaj daŭras ofte jardekojn aŭ eĉ jarcentojn, ĝis oni malkovras la verajn faktojn. Antaŭ 30 jaroj germana komunikosciencisto esploris amaskomunikilojn laŭ uzado de fontoj kaj konstatis, ke en 85 elcentoj de ĉiuj kontrolitaj kontribuantoj la aŭtoroj baziis sin sur nur unu fonto, kiun ili ne kontrolis, do ne re-serĉis. Nun tamen, pro ĝia rapideco, interreto aldonas novan tenton kaj novan riskon por neseriozaj ĵurnalistoj. Por seriozaj validas plu la gvidlinioj kaj maksimumoj de objektiva ĵurnalismo: skeptiko kaj distanco pri kaj al ĉio kaj ĉiu. Ni lernis, ke ni demandu al fakuloj, se ni mem kaj iuj fontoj ne scias, ne povas scii la verajn faktojn. Sed tio ja povas daŭri, oni bezonas tempon por trovi taŭgan fakulon. Kion do fari, se la ĉefredaktoro postulas, ke la artikolo aperu tuj, en la morgaŭa eldono de la gazeto?

Kiel do amaskomunikiloj povas (el)uzi la avantaĝojn, kiujn donas interreto? Ĝi ne povas respondi ĉiujn demandojn, sed eventuale helpi, ke oni pli bone kaj trafe formulu siajn demandojn – al fakuloj. Kaj por ĉiu el ni, ankaŭ neĵurnalistoj, devas esti klare, ke al interreto oni ne povas fidi senplue. ■

Muso kaj elefantaro



Gazetara konferenco de la ĉefministro de Slovenio Janez Janša kaj la prezidanto de la Eŭropa Parlamento Hans-Gert Pötering.

La 1an de januaro 2008 Slovenio, lando kun 0,4% de la loĝantaro de Eŭropa Unio, ekprezidis dum sekva duonjaro la Konsilion de Eŭropa Unio. Temas praktike pri gvidado de la unio, kiun transprenas unuafoje unu el la novaliĝintaj landoj de 2004. Slovenio fariĝas la unua slava lando, kaj la unua eks-socialista, kiu tiel respondecas pri Eŭropo. Ŝajnas, ke muso gvidas elefantaron.

La komencon signis solenaĵo dum la 7a kaj 8a de januaro. Unue kunsidis en Ljubljana la slovena registaro kun la Eŭropa Komisiono, sekvis konferenco pri Interkultura Dialogo, kaj la tuton finstampis granda solenaĵo en kulturdomo, kiun partoprenis 1500 personoj reprezentantaj slovenan eliton, inkluzive du reprezentantoj de Eŭropa Esperanto-Unio.

Danĝero

Dum la konferenco gvidantoj de unuopajsekcioj plurfoje menciis lingvojn kaj kulturon. Zvonko Kovač diris: „Mi esperas, ke en EU ni ne devos komuniki



En la kastelo de Ljubljano estis subskribita deklaro pri kunlaboro de eŭropaj kulturfestivaloj.

nur en la angla lingvo.” Laŭ la filozofo Edvard Kovač: „La nuna dulingvismo (uzo de la gepatra lingvo kaj la angla) estas granda danĝero. Necesas atenti, ke la anglan oni ne proklamu kiel ununuran lingvon de la scienco.” La slovena ministro pri kulturo Simoniti opiniis: „Kulturo ne estas kontraŭulo de la ekonomio, sed ĝi ankaŭ ne estas malriĉa parenco, kiun oni devas ĉiam finance helpi.”

Kulturfestivaloj

Tiam, en la kastelo de Ljubljana, estis subskribata deklaro pri kunlaboro de eŭropaj kulturfestivaloj. Subskribis krom reprezentantoj de dudeko da festivaloj ankaŭ la eŭropa komisionano pri instruado kaj kulturo, Jan Figel, kaj la urbestro de Ljubljana, Zoran Jankovič. Fine, dum la grandioza ferma solenaĵo, parolis i.a. la slovena ŝtatprezidanto, Danilo Turk, la prezidanto de la Eŭropa Parlamento Hans-Gert Pötering, kaj la prezidanto de la slovena registaro Janez Janša.

Eŭropa Esperanto-Unio transprenis la taskon eldoni Informilon pri eŭropaj okazaĵoj dum la slovena gvidado de la konsilio. Raportoj aperos monate en Esperanto kaj pere de Esperanto en kelkaj aliaj lingvoj. Paĝaro en la tri oficialaj lingvoj (slovena, angla, franca) troveblas ĉe www.eu2008.si kaj en Esperanto ĉe euro-po.eu/index.php?art=3&art2=30.

Zlatko TIŠLIJAR

Milito kaj paco



Eblas diveni, kiuj landoj estas la plej pacemaj. Por havi objektivan opinion, esplorkompanio pritaksis 121 landojn kaj konstatis, ke la plej pacema estas Norvegio. Ĝin sekvas Nov-Zelando kaj Danio. La plej agresemaj landoj estas Irako, Sudano, Israelo kaj Rusio. Ukrainio okupas en la listo la 80an lokon.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

Historia momento

En decembro pasintjare granda parto de Eŭropo ricevis historian donacon: al la tiel nomataj Ŝengenshtatoj de Eŭropa Unio (EU) aliĝis naŭ novaj landoj (plejparte iamaj socialismaj landoj). Sekve la kontinenta parto de EU kune kun Islando kaj Norvegio iĝis unueca landego konsistanta el 24 ŝtatoj. Post unu jaro ankaŭ Svislando aliĝos, baldaŭ ankaŭ Rumanio kaj Bulgario.

La ceremonio komenciĝis en Tallinn, ruliĝis suden kaj finiĝis ĉe la itala-slovena ŝtatlimo. Partoprenis kremo da politikistoj, inter aliaj la prezidanto de la Eŭropa Komisiono José Manuel Barroso, la prezidanto de EU José Sócrates, kaj la prezidanto de EU Janez Janza. Malfermis la solenaĵon Barroso, kiu diris: „Vere estas historia momento”.

Limkontrolado

En la nordo restas problemoj pri Kaliningrad (iama Königsberg), „fremda korpo” en la Unio, havanta marbordon, sed bezonanta ankaŭ surteran kontakton kun Rusio. Tie necesas severa limkontrolado. Tamen la historie signifa limo Odro-Niso ne plu ekzistas: la germana kanceliero Angela Merkel ĝin solene malaperigis. Aliloke, la slovaka ministrestro Robert Fico kaj la aŭstra kanceliero Alfred Gusenbauer kune dissegis limobarilon ĉe la aŭstra-slovaka limo.

Tuj poste hungaroj, aŭstroj kaj slovakoj faris ceremonion en la trapasejo Hegyeshalom [hedjeŝhalom]. La hungara ministrestro Ferenc Gyurcsány [djurĉanj] diris: „La neniesejo iĝis ĉiesejo”. En la hungara oni nomumis neniesejo mallarĝan zonon ĉe la limo. Preter neniesejo laŭ la hungara flanko troviĝis tiel nomata fera kurteno kun palisaro, pikdrato, pafistoj kaj minoj. Ĝuste en la iama neniesejo Gyurcsány, Fico, Barroso, Sócrates kaj la aŭstra

ministro Günther Platter metis memorpalison, sur ĝi vojmontriloj.

Laborlokoj

La festoj ne okazis senprobleme. En Germanio kaj Aŭstrio oni timas pri laborlokoj kaj pri teroristoj. En Aŭstrio proksime de Hungario ofte aperis hungarlingvaj surskriboj: „Hungaro! Ne ŝtelu!” Ĉe la slovaka-hungara limo troviĝas urbo Sátorajjájhely [ŝatoraljaujhej], kiun la nova ŝtatlimo en 1920 disigis al hungara kaj slovaka partoj, ĉar Ĉeĥoslovakio pretendis la kompletan fervojan linion el Rumanio. La pli malgranda urboparto kun stacidomo nomiĝas Slovenské Nové Mesto. Inter ili estis trapasejo. La slovakoj timis la supozatan grandan trafi-

kon, tial ili baris la vojon per betonaj flolvazoj.

La ceremonio finiĝis en Skofije, ĉe la slovena-itala limo. Sócrates diris: „Mi ne povus pli bone fini mian mandaton pri prezidanteco” kaj simbole transdonis al Jansa la prezidantecon. Ili konstatis: „Antaŭ 20 jaroj ĉi tie oni pafis la homojn”. Nun 400 milionoj da ŝtatoj de EU libere trafikadas en granda parto de kontinenta Eŭropo.

Karlo JUHASZ

Ĉe la slovaka-hungara limo troviĝas urbo Sátorajjájhely [ŝatoraljaujhej], kiun la nova ŝtatlimo en 1920 disigis al hungara kaj slovaka partoj.



BALKANIO

Vizo-krizo

Frujanuare la registaro de Makedonio decidis insisti pri vizoj por civitanoj de t.n. eksterkomunumaj ŝtatoj, inkluzive de Albanio kaj la estonta sendependa Kosovo. Tio signifas, ke albanoj kaj aliaj petu vizon ĉe makedonaj konsulejoj laŭ la regularo de Eŭropa Unio. La decido vekis miron kaj indignon ne nur en Albanio kaj Kosovo, sed ankaŭ en okcidenta Makedonio, kompakte loĝata de albanetnuloj.

Antaŭ kelkaj monatoj la sama registaro decidis malrespekti unu el la punktoj de la Interkonsento de Ohrid el la jaro 2001. Laŭ la interkonsento oni rajtis, en komunumoj kaj urboj loĝataj plejparte de albanoj, starigi tutjare la nacian albanan flagon, ne simple festtage. Cetere la registaro prokrastis plenumadon de la interkonsento inter la du ĉefaj popoloj

de la respubliko ankoraŭ ne agnoskita de Grekio.

Homoj kaj varoj

La vizo-decido ege malhelpas la liberan moviĝon de homoj kaj varoj inter landoj intime ligitaj. La registaro de Albanio protestis, same politikaj partioj. Simile okazis en Kosovo kaj en okcidenta Makedonio. La albana prezidanto Bamir Topi taksis la decidon „hasta kaj

nerespondeca, des pli ĉar mem Eŭropa Unio decidis notinde malpezigi la vizo-reĝimon kun Albanio en januaro 2008”.

Intertempe daŭras diplomatia intertraktado por renversi la decidon. Same nepras, ke aliaj landoj, kiel Bulgario, rezignu pri novaj reguloj limigantaj transnacion transporton. La regiono bezonas liberan interkomunikadon, alivorte sian balkanan „ŝengenon”.

Bardhyl SELIMI



WWW.SOLIDARIES.ORG



LETERO EL LA KARCERO

Surrealismo, surrealismo

MONATO-kunlaboranto
Petro Desmet' estis
en la malliberejo
de Dendermonde.
Li estis enkarcerigita sub
suspekto, ke antaŭ pli ol
10 jaroj li sekse atencis
tiam ankoraŭ ne adoltan
knabinon. Lia procezo,
kiu difinos, ĉu la ŝtato
konsideras lin kulp
aŭ ne, okazos nur post
kelkaj monatoj.
El la malliberejo li sendis
al MONATO la jenan leteron.



*Petro Desmet' unu jaron antaŭ sia arestado (apud Imelda Wuyts)
dum festo en Antverpeno.*

Karaj geamikoj,

Mi sidas en malliberejo kaj riskas
punon de pli ol 15 jaroj (= mortopuno
por 74-jarulo) kaj tio absolute centelcen-
te senkulpa! Iu ekspianolernantino mia
estas nun en psikiatra kliniko kun nesa-
vebla anoreksio kaj aliaj psikaj aferoj ...
kaj ŝi faris monstrajn akuzojn kontraŭ
mi. Mi ĵuras antaŭ vi, je ĉio, kio estas al
mi kara, ke mi en la pasintaj 40 jaroj ne-
niam faris ion ajn pri kio mi devus honti,
sed dume mi sidas tie ĉi.

Nia ĉelo (2 x 4 m), kun volba pla-
fono, estas flave farbita, sed multe da
grafitioj estas, kun nomoj kaj datoj de
antaŭaj pasantoj. Krom la televido estas
malgranda tableto kun du seĝoj. Estas
starŝranko (kun vando rompita – granda
truo farita de iu antaŭulo dum kolera kri-
zo), en kiu kuŝas miaj vestaĵoj, kiuj do
bone aerumiĝas. Estas pendigita ŝranketo

***La sanzorgoj ĉi tie estas
tre malbonaj. Neniu vere
zorgas vin, kaj ne estas eblo
akiri, ke oni mezuru eblan
febron! Imagu! Surrealismo,
surrealismo, surrealismo,
surrealismo, surrealismo!***

kun mia manĝilaro ktp kaj tre malgranda
glaciŝranketo. En ĝin oni povas meti la
aĉetaĵojn kaj la buteron kaj la konfitaĵon,
kiujn oni unufoje en la semajno ricevas.
Estas kraneto kun lavujo (nur malvarma
akvo) kaj apude, malantaŭ ligna fald-
ebla ŝirm-ekraneto, estas la necesejo.
Super ĝi la fenestreto, kun diversaj tavolo-

loj da kradoj kaj kraderoj. Tamen tra ili
mi sukcesas doni manĝon al la kolom-
boj, kiuj venas manĝi de miaj fingroj. Ili
ja scias, ke ili ne timu min, ĉar la mal-
libero estas en mia flanko.

La sanzorgoj ĉi tie estas tre malbo-
naj. Neniu vere zorgas vin, kaj ne estas
eblo akiri, ke oni mezuru eblan febron!
Imagu! Surrealismo, surrealismo, surre-
alismo, surrealismo, surrealismo!

Pastro

Ankaŭ la mallibereja pastro okupiĝas
pri neniuj. Nur la trian tagon, post
senĉesa petado, petegado, li montris sin
du minutojn, kaj poste tute ne plu. Mi
ĉeestis lian kristnaskan servon, kiu estis
tre bona, sed nun mi kakos sur lin.



En tiu ĉi malliberejo MONATO-kunlaboranto estis senproceze enkarcerigita.

БОЛКОВ ВЛАДИМИР СЕРГЕЕВИЧ



AARO HAAPANEN

„Estas fenestreto, kun diversaj tavoloj da kradoj kaj kraderoj. Tamen tra ili mi sukcesas doni manĝon al la kolomboj, kiuj venas manĝi de miaj fingroj. Ili ja scias, ke ili ne timu min, ĉar la mal-libero estas en mia flanko.”

pri via vizito, pere de letereto (raporto en nia ĵargono) al la estimata honorinda direktoro ... aldonante kopion (kiun vi perletere, nepre per normalpoŝta letero estas sendinta) de via identiga karto.

Hierarĥio

Post funda kontrolo en komputilo (mi supozas) ĉe diversaj instancoj, diversaj hierarĥioj decidas pri via fideindeco kaj allaseblo. Tiam mi ricevos sciigon pri tio, subskribas la decidon de la hierarĥio kaj redonas la dokumenton, por ke ĝi estu gardita ĉe Cerbero (la pordogardist(in)o): ĉiumomente, dumvoje, la dokumento povas perdiĝi. Kaj ... dimanĉe oni ne permesas vizitojn (ĉar ne estas sufiĉe da gardistoj dum la semajnfino) kaj sabate rajtas havi vizitanton nur tiu, kiu dum la tuta semajno estis sen ili. Plie oni rajtas nur maksimume tri vizitantojn samtempe kaj nur tri fojojn en semajno dum bone difinita horaro. Vizitanto ofte unu horon antaŭe devas enskribiĝi kaj pacience atendi enlason sub gvido de afabla aŭ malafabla gardisto. Se vizitanto venas eĉ nur unu minuton post la anoncita horara tempo, li/ŝi ne estos enlasita. Nepre oni lokigas

ankaŭ ilin en la suferantaro, ĉar ja „amiko de amiko estas mia amiko!”. Fojfoje ankaŭ okazas, ke la vizitoto ne estas libera (nu ja, neniŭ estas libera ĉi tie, sed mi celas „libera, disponebla” en sia mallibereco), ĉar oni ĵus esplordemandas lin, aŭ administrumas lin. La justeco ja devas havi sian vojon!

Rubujestro

Koni la regulojn estas treege grave. Ĉiumatene je la 5:45 kun la rubujo (simbolo?!) oni transdonu la „raportfoliojn”, do ĉiujn petojn, mendojn, ktp. Do, kiam mi estis enŝlosita, mi tuj petis (mardon), ke mi jaŭdon (la tagon antaŭ la decido de la komisiono) povu legi mian „dosieron”. Mi pensis, ke ĉio do estas en ordo ... sed jaŭdon mi ne rajtis dosierumi, ĉar mi **tiun matenon** ne estis petinta tion! La raportfolioj ja validas nur dum unu tago kaj devas esti transdonitaj en la ĝusta momento. Cetere, se la rubujestro tro rapide forkuras ... vi havas malbonŝancon kaj devas atendi plian tagon.

Pri kio oni pensas tie ĉi? ... se entute pensi oni kapablas! Nepre pri ekstere, nepre pri hejmo, nepre pri edzino, nepre pri geamikoj, nepre ... pri la nekompreneblo kaj nekomprenemo de la „normala” mondo. Oni pensas pri aferoj, kiujn oni normale timas (atendado en stacidomo ktp), sed kiujn oni ĉi tie ... sopiras.

Ĝuu vian nunan liberon, gekaruloj!

Petro DESMET'

Kiu volas ekscii pli pri la vivo kaj farto de Petro Desmet' povas legi lian blogon en la jena adreso:
www.ipernity.com/blog/petro_desmet/?lg=eo.

Nuboj-duboj

Lastatempe plimultiĝis turistoj en Albanio, kiuj interesiĝas pri pentraĵoj de la komunisma erao. Tamen strange estas, ke en tiuj bildoj apenaŭ videblas nuboj kaj pluvo. Tio ne estas hazardo. Laŭ la tiama, t.n. realisma metodo, praktikata tra la komunisma mondo, nuboj kaj pluvo reprezentis malhelan bildon pri vivo kaj socio. Pro tio pentristoj devis ilin ignori.

Rakontita estas jena anekdoto el Bulgario. Pentristo proponis al ekspozicio pentraĵon, en kiu aperas nuboj. La organizantoj ĝin rifuzis, dirante, ke ĝi ne spegulas la realon en la komunisma Bulgario. La postan tagon, laŭ propono de amiko, la pentristo reproponis sian pentraĵon, sed ŝanĝis la titolon de Sofio al tiu de urbo en nekomunisma lando,



Mozaiko en la fasado de historia nacia muzeo en Tirano.

kie rajtas ekzisti nuboj. La pentraĵon oni akceptis.

En tiama Sovetio, kiam okazis milit-parado aŭ alia oficiala manifestacio sur Ruĝa Placo, ne pluvis. La instancoj ordonis, ke sciencistoj kaj militistoj forigu la nubojn de la moskva ĉielo. Same oka-

zis en Pekino, kaj eble okazas en aliaj urboj, kie ankoraŭ regas komunistoj.

Bardhyl SELIMI



Laŭ la tiama, t.n. realisma metodo, praktikata tra la komunisma mondo, nuboj kaj pluvo reprezentis malhelan bildon pri vivo kaj socio. Pro tio pentristoj devis ilin ignori.

LITOVIO

Mispaŝe ...

Litova bienisto, la 41-jara s-ro Saulius, neniam forgesos sian viziton al agrikultura ekspozicio en la germana urbo Hannover. Hejmenirante, li elaŭtobusiĝis kun kolegoj en la urbo Leipzig, tie perdiĝis, kaj fine atingis piede sian hejmon – 900 km for.

La sambusanoj kontaktis la policon en Leipzig, sed la perditon ne troveblis. Saulius pasigis entute kvar tagojn en Leipzig, kie pro nescio de la germana li ne kuraĝis peti helpon. Fine li trovis vojon al Pollando kaj komencis piediri. Survoje li manĝis pomojn kaj trinkis el riveretoj. En Pollando li vidis kamionon kun litovaj ŝildoj. La ŝoforo veturigis s-ro'n Saulius al lia hejmlando. La bienisto, kun vunditaj piedoj, longe dormis kaj ĵuris ne plu forlasi Litovion.

last

KUIRARTO

La kukurbo – frukto multvizaĝa



Maturaj kukurboj kreskas sur kampo en Orienta Stirio.

Aŭstrio honoras siajn kukurbojn per poŝtmarko surhavanta la esperantan nomon.

Oktobro estas la monato de la kukurboj kaj de la kukurb-festo, ankaŭ en Orienta Stirio, parto de Aŭstrio. Ĉie oni rikoltas,

senkernigas, ĉizas kaj manĝas la globoformajn fruktojn, kiuj botanike estas parencaj al la beroj.

En Mez- kaj Sud-Ameriko kukurboj estis unu el la ĉefaj indianaj manĝaĵoj. En la 16a jarcento portugaloj transportis kukurbojn al Eŭropo kaj Ĉinio. Tiam



Kukurbo entenas multajn vitaminojn kaj, kun nudeloj, bongustas.



Dum kukurbo-festo oni ĉizas vizaĝojn el la malplenaj kukurboj.

kukurboj estis manĝaĵo por malriĉuloj aŭ bestoj. Nur dum la lastaj jaroj kukurboj eniris altnivelan kuirarton, ne nur pro la bona gusto, sed ankaŭ pro tio, ke ili enhavas multajn vitaminojn.

Kukurbojn oni rikoltas per grandaj maŝinoj. Tamen kelkaj kamparanoj

rikoltas mane kaj poste kunsidas kaj senkernigas la kukurbojn. El la karno oni faras kukurbaĵon kun nudeloj aŭ viando kaj surverŝas iom da kukurba kernoleo. Oni spicas per dolĉa paprik-pulvoro kaj pipro.

En oktobro, dum kukurba popol-

festo, oni ĉizas en la ŝelon de la malplena kukurboglobo vizaĝon kaj lumigas per kandelo. La restaĵoj fariĝas sterko por la venonta jaro. Ses monatojn poste, en printempo, eblas admiri la belajn kukurb-florojn.

Walter KLAG

Nagasaki



Tramoj en diversaj stiloj kaj koloroj estas allogaĵo.

Nagasaki estas ĉefurbo de la samnoma prefektujo sur la sud-japana insulo Kiuŝuo. En la urbo loĝas 420 000 loĝantoj kaj ĝi lastatempe estiĝis turisma loko, kiu allogas multajn vizitantojn.

En Nagasaki regas agrabla etoso kaj estas multaj vidindaĵoj. Unue, tramoj. Se vi aĉetus unutagan bileton kontraŭ 300 enoj (2 eŭroj), vi povus entramiĝi kaj ĝui tramvojaĝon tra la urbo. La tramoj mem, en diversaj stiloj kaj koloroj, estas allogaĵo. Due, pontoj. Tra la urbo fluas rivero Nakaĵima-gaŭa, super kiu estas konstruitaj pli ol dek pontoj laŭ malnova stilo. La plej fama estas Meganebaŝi (Okulvitra ponto). Vi povus piede

ĝui promenadon laŭ tiuj pontoj. Sub ili foje flugas birdoj, ekzemple motaciloj kaj ardeoj, kaj en la rivero estas karpoj. Trie, stratoj. Estas stratoj kun divers-specaj magazenoj: ekzemple vendejoj de tradiciaj kukoj, ornamaĵoj el keloniaĵo, memoraĵoj kaj aliaj. Inter ili troviĝas bazaroj kaj temploj. Oni organizas multajn laŭtemajn ekskursojn tra Nagasaki. Ĉi-sube ni prezentos tri gravajn vidindaĵojn: Deĵima, Parko de Paco kaj Ĝardeno de Glover.

Deĵima

Kristanismo atingis Japanion en 1549. Feŭdestroj konkure invitis portugalojn cele al komerco. En prefekt-



Pli ol 10 malnovstilaj pontoj ligas la bordojn de la rivero Nakaĵima-gaŭa.

ujo Nagasaki eŭropaj ŝipoj komencis enhaveniĝi kaj ekde 1580 dum sep jaroj Nagasaki estis feŭdo de jezuitoj. La urbo prosperis kiel urbo de kristanoj kaj loko de la komerco kun eŭropanoj. En Nagasaki estis multaj kristanaj preĝejoj kaj la eksterlandanoj loĝis tie libere. La urbo estis nomata „Eta Romo” pro la ekzota etoso.

Tamen la tiama reganto de Japanio Tojotomi Hidejoŝi ne ŝatis kristanismon kaj ordonis la forpelon de kristanaj misiistoj el Japanio, reteninte Nagasakon kiel sian feŭdon. Tiun politikon daŭrigis ankaŭ la sekva reganto Tokugaŭa Iejasu. Sub lia regado Nagasaki plu prosperis pro la komerco ne nur kun Portugalio, sed ankaŭ kun aliaj landoj.

En 1635 la registaro malpermesis la elmigradon de japanoj. En la sekva jaro oni estigis insuleton en la golfo de Nagasaki, nomatan Deĵima por loĝigi sur ĝi portugalojn. En 1637 okazis la Ribelo de Ŝimabara kaj la registaro suspektis la envolvigon de portugaloj en ĝi. Pro tio finfine en 1639 oni forpelis ilin el Japanio kaj tiel komenciĝis la izoleca politiko de Japanio.



Tiutempe al la japana registaro plaĉis la indiferenta sinteno de nederlandanoj rilate la disvastigon de kristanismo. Tial en 1641 la nederlanda faktorio translokiĝis de Hirado al Nagasako. Dum la sekvaj 218 jaroj Nederlando kaj Ĉinio monopoligis la komercon kun Japanio. Tiutempe en Nagasako la nederlandanoj vivis izolite sur insuleto Deĵima kaj troviĝis sub la severa kontrolo de registaro.

Nederlandaj ŝipoj transportis al Japanio ĉefe silkaĵojn, lanaĵojn, sukerojn, tinkturojn, medikamentojn, vitraĵojn ka, dum Japanio eksportis unuatempe arĝenton kaj kupron, kaj poste kamforon, porcelanon, lakaĵojn, sojsaŭcon kaj marproduktaĵojn. La porcelanaĵoj el Imari estis tre alte taksataj en Eŭropo kaj ties imitaĵojn oni grandkvante produktis en Meissen [majsen], Germanio. La importo de silko kaj sukero multe influis la vivon de japanoj. Kvankam la insuleto Deĵima estis malgranda, ĝi tamen ludis konsiderindan rolon por la rilatoj inter Japanio kaj Eŭropo.

Kiam Japanio modernigis en la 19a jarcento, la rolon de Deĵima kaj Naga-



Skulptaĵo de Niŝimura Seiboo atentigas pri la atombombo.

sako transprenis Jokohamo kaj Kobeo. Por reakiri la perditan gloron la urbo opiniis, ke necesas renovigi la havenon. En 1883 kaj en 1897 oni rekonstruis ĝin kaj polderigis la maron ĉirkaŭ Deĵima. Post multaj jaroj, en 1984 oni esploris la insuleton kaj trovis ŝtonbarilojn ĉe ties orienta kaj suda limoj. La renovigo de Deĵima daŭris kaj en la jaro 2000 tie estis rekonstruitaj kvin domoj, kaj en 2006 kvin pliaj surbaze de pentraĵoj kaj rezulte de prifosoj. En la restaŭritaj domoj oni ekspoziciis eksponaĵojn el la iama vivo de nederlandanoj kaj japanoj kaj elfosaĵojn el la ruinoj.

Parko de Paco

La 9an de aŭgusto 1945 usona bombaviadilo B-29 kun atombombo ekflugis de insulo Tenian en la Pacifika Oceano al Nagasako kaj faligis ĝin je alteco de 9600 metroj. La bombo eksplodis 500 metrojn super urba distrikto Macujama. Tiutempe en la distrikto loĝis 1860 personoj. Ĉiuj homoj tuj mortis escepte de unu knabino, kiu restis en rifuĝejo. Ĉiuj konstruaĵoj estis forbruligitaj pro la eksploda blovego. La plago vastiĝis laŭ rivero Urakami-gaŭa kaj atingis la centron de Nagasako. Fine de 1945 la nombro de mortintoj jam estis 73 884, kaj



la vunditoj nombris 74 909 el 240 000 loĝantoj de la urbo.

En la Muzeo pri la atombombo, konstruita memore al la 50-jariĝo de la katastrofo en Nagasako, oni eksponis ruinaĵojn de katedralo Urakami, deformitan akvorezervujon, bruligitan lunĉoskatolon de lernantoj, fanditajn metalaĵojn kaj botelojn, parte bruligitajn vestaĵojn kaj simile.

Sur monteto norde de la muzeo troviĝas Parko de Paco. En ĝi ĉe fontano estas ŝtonplato, sur kiu estas gravurita jena noto de lernantino: *Mi estis netolereble soifa. Mi trovis akvon malpure kovritan per oleaĵo. Mi ne povis elteni la soifon kaj fine mi trinkis tiun akvon kune kun la oleaĵo.* Multaj viktimoj de la atombombo simile suferis la soifegon kaj mortis pro akvomanko. Tiu fontano estis konstruita memore al la suferintoj.

Se vi promenus al la centro de parko, tie vi vidus grandan statuon de homo. La skulptaĵo estis kreita de Niŝimura Seiboo el Nagasako. Ĝia dekstra mano, montranta la ĉielon, atentigas pri la atombombo, la maldekstra mano, etendiĝanta horizontale simbolas pacon, kaj la fermitaj okuloj – preĝon al la mortintoj.

Laŭ la stratoj ĉirkaŭ Parko de Paco kaj la Muzeo pri la atombombo estas monumentoj omaĝe al la pereintoj.

Ĝardeno de Glover


Skoto Thomas Blake Glover, post longa vojaĝo al Japanio, venis al Nagasako en 1859, kiam li estis 21-jara. Li konstruigis sian domon en 1863 sur monteto Minamijamate, loĝdistrikto de eksterlandanoj. Tiam la urbo viglis pro energiaj homoj, kiuj esperis je la veno de nova epoko en Japanio, pro komercistoj el diversaj landoj, revoluciuloj, celantaj renversi la ŝogunan reĝimon, pro junuloj, dezirantaj lerni en Eŭropo. Glover zorgis pri tiuj homoj, precipe pri junuloj, kiujn li sekrete sendis eksterlanden. Ili poste ludis gravan rolon en Japanio. Post la modernigo de la lando li multe kontribuis por la evoluigo de ekonomio kaj enkonduko de la eŭropaj sciencoj. Nun la ĝardeno kun la loĝdomo de Glover estas malfermita al vizitantoj.

Hori YASUO

Ĉu estas homoj rezistaj al aidoso?

En la mondo daŭras la senbrida kaj furioza disvastiĝo de aidoso. La ununura absoluta garantio kontraŭ malsaniĝo dume restas la preventado de infekto. Sed nuntempe kuracistoj atentigas kvazaŭ ne egalan susceptivecon de diversaj homoj al la viruso de aidoso. Estas unuopaj homoj, kiuj dum multaj jaroj ne infektiĝas, malgraŭ multenombraj seksaj kontaktoj kun HIV-infektitoj. Certe, tio povas dependi de pluraj kaŭzoj: eble malalta patogeneco de certaj stamoj de la virusoj, uzado de defendrimedoj (kondomoj), foresto de aliaj seksaj malsanoj, kiuj pligrandigas la probablecon de HIV-infektado, kaj aliaj. Sed lastatempe sciencistoj esploras iujn internajn mekanismojn, kiuj povas klarigi la relativan rezistecon de iuj personoj al aidoso.

Kiel sciante, la viruso de aidoso havas la specifan proprecon infekti precipe la ĉelojn de la imunsistemo: limfocitojn, monocitojn kaj aliajn. La ĉefa celo de la virusoj estas la limfocitoj, kiuj portas sur sia surfaco tiel nomatan receptoron (akceptilon) CD4. Sur la ekstera kovrilo de la viruso de aidoso troviĝas la glikoproteino 120, helpe de kiu la viruso aliksiĝas al la ĉela receptoro CD4 kaj poste penetras en la ĉelon. Sed krom CD4 sur la surfaco de imunaj ĉeloj estas specifaj proteinaj substancoj, tiel nomataj receptoroj por kemikinoj. (Kemikinoj realigas en organismo interagadon inter diversaj imunaj ĉeloj.) Kaj la viruso de aidoso utiligas ankaŭ tiujn receptorojn por penetri en imunajn ĉelojn. Ekzistas kelkaj tipoj de receptoroj por kemikinoj, la plej studita el ili estas CCR5.



Antaŭ kelkaj jaroj usonaj sciencistoj, J. M. MacNicholl kaj aliaj, montris, ke kaŭze de mutacio de la koncerna geno en la organismo povas foresti la receptoro CCR5, kaj sekve de tio la viruso de aidoso ne povas penetri en imunajn ĉelojn. En tiu okazo, laŭ opinio de kelkaj sciencistoj, la homo fariĝas relative rezista al aidoso. Tamen tiu rezisteco estas relative malofta kaj ne absoluta. Krome, ĝi koncernas nur iujn homojn, kiuj infektiĝas per seksaj kontaktoj. Se la homo infektiĝas per infektita sango (utiligo de ne sufiĉe sterilizitaj injektiloj, transfuzado de infektita sango, plasmokito), eĉ la foresto de la supremenciitaj receptoroj ne defendas kontraŭ aidoso.

Laŭ opinio de sciencistoj, tiuj genaj anomalioj troviĝas meznombre ĉe proksimume 1-2 % de homoj, ili akiras la relativan rezistecon al aidoso. Sed iuj specialistoj pri genetiko argumentas, ke inter iuj popoloj de Norda Eŭropo (finnoj, estonoj ktp) la ofteco de similaj protektaj genaj anomalioj estas pli alta.


Laŭ informo de la sciencistoj de la Instituto de Ĝenerala Genetiko nome de N. I. Vavilov (Moskvo), ĉe popoloj de la eŭropa parto de Rusio la ofteco de la protekta anomalio de la geno respondeca pri CCR5 estas ĉirkaŭ 15 % (S. Borinskaja, *Medicinskaja gazeta*, n-ro 8, 2005). Sed estas malfacile konsenti kun la konkludo de rusiaj genetikistoj, ke por rusoj la risko de apero de aidoso estas malpli alta, ol por plimulto de eŭropaj popoloj, konsiderante la intensan disvastigon de HIV-infekto en nuntempa Rusio (nur oficiale la nombro de HIV-infektitoj superas 360 milojn, sed, laŭ opinio de multaj epidemiologoj, la reala nombro superas unu milionon). Ni opinias, ke la risko de HIV-infektado pli multe dependas de konkreta epidemia situacio, ol de etnaj kaj naciaj diferencoj.

Do, estas vere, ke iuj homoj havas relativan rezistecon al aidoso. Sed ne ekzistas homoj absolute rezistaj al HIV-infekto.

Vladimir LEMELEV

FINNLANDO

Nordiaj rozoj



ANSSI KOSKINEN

En forlasitaj ĝardenoj, kortoj kaj en ne plu prizorgataj parkoj oni trovas malnovajn rozujojn. El ties radikoj ĉiam kreskas la samaj rozoj, eĉ post frosta vintro kaj difektiĝo de la pasintsomeraĵoj. Tiuj rozoj ne estis greftitaj. Ties draĵoj kaj

stikaĵoj floras kiel la devena planto. Tial ili estas tre ŝatataj en la severa klimato nordia, kie la greftitaj rozoj de pli sudaj landoj facile malboniĝas aŭ ne povas esti kultivataj.

En Finnlando hobiaj ĝardenistoj interŝanĝas siajn plantojn kaj spertojn en kadre de 1100-membra roza societo, fondita en 1989. Ĝia prezidanto Lauri Korpiaakko havas pli ol 140 rozajn speciojn en sia ĝardeno, kie ili abunde floras unu post la alia aŭ multaj samtempe. Bonodoro de tradiciaj rozoj plenigas la ĝardenon. Iliaj floroj ne estas tiel grandaj, kiel tiuj de eksterlandaj rozoj, sed la plantoj vere rezistas kaj afidoj malofte atakas ilin. En malmultaj landoj eblas trovi plantojn persiste kreskantajn en forlasita loko, ĉar kutime la denseco de loĝigo rapide okupas ĉiun liberan teron.

La finna roza societo publikigas gazeton *Ruusunlehti* [„lehti” signifas petalon; folion; gazeton]. Grupetoj de rozohobiantoj renkontiĝadas por rigardi fotojn, aŭskulti prelegojn kaj ekskursi. Krome ili partoprenas en ĝardenaj ekspozicioj kaj foiroj. Ili interkonsiliĝas rete. Ĉiun duan jaron nordiaj rozosocietoj vice okazigas internacian renkontiĝon. La trovitaj rozaj specioj estas komparataj kun la jam konataj. Se la trovita rozo estas vere nekonata, oni nomas ĝin je la loko, kie ĝi estis trovita, aŭ je iu famulo, nobelo aŭ artisto, iam loĝinta en tiu loko. La trovintoj faras ĉion eblan por bone kultivi la planton, elfositan inter herbaĉoj kaj arboj. Se ili bone sukcesas, ili sciigas pri la trovaĵo siajn samideanojn kaj donacas aŭ vendas stikaĵojn, draĵojn aŭ eĉ radikojn al geamikoj kaj aliaj interesitoj. En la floroj de tiuj rozoj kaŝiĝas historia ĉarmo kaj legendoj.

Saliko



MARIJATTA

Sidante en pudingo, mi alvokas miajn savantojn!

Taŭga esprimo, mi pensas, apud la kutimaj „sidi en peĉo, kaĉo, merdo”, por esprimi embarason, konfuziĝon. Mi estis embarasita, kiam mi konstatis, ke ne ĉiu pensas pri sama afero, kiam li aŭdas la vorton „pudingo”. Se mi aŭdas la vorton, mi pensas pri iu flava, vanilita, duonsolida, do ŝanceliĝema, dolĉa manĝaĵo, nevarma, varmeta aŭ malvarma deserto, ŝutita sur teleron aŭ ankoraŭ ripozanta en ujeto vitra, porcelana, kartona, plasta aŭ en granda poto, atendanta esti elkulerita de frandemul(in)o. Brito tamen, pensas pri tute alia afero ... Kaj tamen, la vorto „pudingo” estas unu el la plej internaciaj, ĉar mi trovis ĝin en multege da lingvoj, iom transformita iufoje, sed ĉiam rekonebla, eĉ en la japana, kaj ĉina, kaj slovaka, kaj rusa, kaj nederlanda, franca, itala, hispana. Tiel mi do malkovris, ke la bona Dio, tamen en iu kolera momento, kiam li, en Babelo, decidis: „Ni malleviĝu do, kaj Ni konfuzu tie ilian lingvon, por ke unu ne komprenu la parolon de alia” (Gen 11.7), ne nur zorgis, ke la homoj parolu diversajn lingvojn, sed ankaŭ – kaj tio pli malofte estas rimarkata – ke ili uzu samajn vortojn por paroli pri malsamaj aferoj, kaj tiel plej efike konfuzu unu la alian!

Nun estus interese esplori, ĉu la kuracilo de tiu dia damno, Esperanto, sukcesis vere liveri rimedon por eliri el tiu mizero, por restarigi la interkompreniĝon ... ĉar ankaŭ en Esperanto ekzistas la vorto „pudingo”. En la praktiko mi konstatis ... ke ne, ĉar ĉiu verdstelulo uzas la vorton laŭ (kaj kun) la signifo, kiun ĝi havas en lia nacia lingvo ... sed ... li ne nepre pravus farante tiel! Ekzistas ja normlibro(j), kiu(j)n ĉiu verdstel-



Multaj nacioj komprenas sub “pudingo” ion tute alian.

ulo estas supozata obei. Minimume oni obeu ja la *Fundamenton*, pri PIV oni ja povas diskuti! Estas do interese esplori la tutan situacion ... kvankam mi ne fleugas la iluzion, ke mi ŝanĝos la kutimojn kaj rekondukos la gregon sur la ĝustan rektan vojon!

Sed ni eble komence reiru al la vorto sankciita de la dek-kvina regulo de nia dek-ses-linia dekalogo, al la universala tutmonda vorto *pud(d)ing*. Laŭ la esploroj, aŭ inspirita sonĝo, de iu dokta filologo – li estu honorata – la etimo de la naciaj vortoj estas la angla *pudding*, kiu mem etimologie rilatas al malnovĝermana *pud*, kiu signifis „premi

ion, kunpremi ion”. Jes, ja, la origina maniero por prepari iun ajn pudington estis, ke oni plenigis iun tolan sakon (tukon aranĝitan kiel sako, per kunligado de la kvar anguloj) per kaĉo el lakto, faruno kaj/aŭ diversaj aliaj aferoj kaj ke oni metis la fermitan sakon (fermitan per ŝnuro aŭ firma ligado) en bolantan akvon. Cetere ankoraŭ nuntempe iuj pudingo estis prefere tiel preparataj (vidu la biblion de Aŭgusto Escoffier). En tia maniero oni ankaŭ plenigis (purigitajn, mi esperas) bestajn intestojn (post forpreno el la besto, kompreneble) per io (ekzemple miksaĵo de viando, spicoj kaj sango) kaj preparis ilin en la sama



Tio ĉi ne estas pudingo!

maniero. Jen la klarigo, ke la angla vorto *pudding* indikas ankaŭ iujn specojn de kolbasoj, kaj ke la sangokolbaso en Francio ricevis la nomon *boudin*. Cetere tio estas la etimo de la esperanta nomo „budeno”!

Ni komence esploru la naciajn pudingojn, kaj, ĉar la angloj ja estis sufiĉe grandanimaj por transdoni sian vorton al la tuta homaro, ni unue esploru la anglajn, la boanglajn (kiuj precipe troviĝas en Usono) kaj la eksfianglajn (kiuj precipe manĝiĝas en Aŭstralio) pudingojn. La aŭtoritata deca oksforda vortaro konas precipe du signifojn: 1. Mola aŭ iom rigida miksaĵo de bestaj aŭ legomaj ingrediencoj, speciale miksitaj aŭ enfermitaj en faruno aŭ alia farunecaĵo, kuiritaj per boligado, vaporumado aŭ bakado; 2. Intestoj de porko ktp, stufitaj kun avenfaruno, sango ktp. Alia aŭtoritata verko, la *Norma Vortaro* de Funk kaj Wagnalls (ofte nomata *Collier*), havas iom alian opinion. Ankaŭ ĝi du signifojn citas: 1. Dolĉigita kaj gustigita deserto el mola manĝaĵo, kutime faruneca; 2. Intesto plenigita de spicita viando, sango ktp kaj kutime boligita aŭ stufita. La boangla, usona, vortaro prestiĝa, la *Webster*, donas malsamajn difinojn en la luksa eldono kaj en la popoleca. Por riĉaj doktuloj *pudding* estas dolĉa

deserto, dika kaj mola, tipe konsistanta el faruno kaj lakto kaj fojfoje fruktoj; por plebano temas pri deserto de mola, spongeca aŭ denskrem-eca konsisto. Estas do fakte sufiĉe da malsamopinio inter tiuj diversaj difinoj. Rapida vizito al la angla *Vikipedio* instruis al mi, kaj mi tendencas kredi ĝin, kvankam mi neniam manĝis sango-kolbason kiel deserton, ke por anglo *pudding* estas sinonimo de *dessert*.

Por nederlandlingvanoj la nederlanda lingvobiblio dekrete, ke *pudding* estu 1. Pasto el faruno aŭ pecigita pano, lakto, ovoj, rengraso ktp boligita aŭ bakita en stana muldilo, kaj petas, ke oni komparu kun *plum pudding*: 2. Miksaĵo de faruneca substanco (rizo, maizamelo, grio aŭ similaĵo) kaj lakto aŭ kremo kun gustigaĵoj, aŭ ankaŭ fruktsuko pretigita kun aglutinilo kaj, post malvarmiĝo, servita kiel deserto. Ĝi aldonas, ke en 1668 la signifo estis: pasto el faruno, rengraso ktp metita en tukon kaj boligita.

Ni restu, provizore, ĉe la ĝermanidoj. La granda, dika, dudek-kvar-voluma *Brockhaus* mirigis min! El ĉiuj konsultitaj verkoj ĝi estas la plej moderna, ĉar ĝi ŝajne konas nur la pudingon el plej moderna tempo. Komence ĝi deklaras, ke la vorto devenas de la malnovfranca *boudin*, kiu (prave) signifas „kolbaso”, kaj tiam daŭrigas: normale pere de pudingpulvoro – prete miksitaj produktoj (plej ofte el amelo kaj gustigaj elementoj) – farita dolĉaĵo, kiun oni miksas malvarme aŭ miksas kaj poste boligas. Iom mirigas min, ke *Brockhaus* ne diras, kun kio oni ĝin miksas! Supozeble la dietpudingo miksiĝas kun akvo, la normalpudingo kun lakto?

Ĉe la francoj la vorto estas konata, sed tamen iom konsiderata fremdvorto. La bofrancoj (ili loĝas en Valonio) kontraŭe tre bone konas ĝin, kun la signifo, kiun ĝi havas en la nederlanda. *Larousse* klarigas ke, *pudding* aŭ *pouding* estas deserto sukerita surbaze de faruno, sukero kaj butero en samgrandaj kvantoj, kaj ĝi estas garnita de fruktoj. La angla pudingo, aŭ *plum pudding*, estas karakterizita per uzado de bova graso. La *Petit Robert*, kiu ĉe doktuloj

ĝuas plej bonan reputacion, distingas inter *pudding* kaj *pouding*. *Pudding* estas torto surbaze de faruno, ovoj, bovograsso kaj sekvinberoj ofte parfumita per alkoholaĵo = *plum pudding*. *Pouding* estas maldelikata torto farita de bakistoj surbaze de malfreŝiĝinta pano. Mi aldonu, ke mi konstatis, ke ne ĉiuj francoj eĉ konas la vorton *pudding*, sed jes ja *flan*. Sed ... mirige, nia estimata Escoffier ne uzas en sia libro, ankaŭ ne en la franca, la kategorion *flan*, sed abunde la kategorion *pudding* (en iuj receptonomoj li uzas la vorton *flan*).

La hispana sendiskuta aŭtoritato, la *Réal*, oficiala klariga vortaro de la hispana lingvo, konas *pudin*, aŭ *pudín*, en du signifoj: 1. Dolĉaĵo, kiu prepariĝas el biskvitoj aŭ pano metitaj en lakton kaj kun sukero kaj sekaj fruktoj; 2. Simila plado, ne dolĉa. Kaj utile eble estas aldoni la difinon de *flan*: Deserto, kiu prepariĝas el ovoflavaĵoj, lakto kaj sukero kaj kuiriĝas en bolbano, en iu muldilo, ĝenerale kovrita de karameligita sukero.

Kaj kio nun pri nia internacia „pudingo”? La *Fundamento de Esperanto*, en sia *Universala Vortaro*, ne konas pudingon. Sed jam en la unua oficiala aldono de la Akademio ĝi aperas. Tio tamen ne multe helpas nin, ĉar la aldonoj estas nur simplaj vortoj, sen la kvin kutimaj tradukoj nacilingvaj de la *Fundamento*. Sed, feliĉe, „pudingo” aperas en la vortaro de Kabe, kun la difino: „angla dolĉa manĝaĵo, preparita el faruno kaj sekvinberoj”. Eble la recepto estas iom tro simpligita, sed almenaŭ estas klare, pri kio temas. Por Verax „pudingo” nur povis esti sinonimo de „pudingŝtono”: „rokaĵo konsistanta el ŝtonetoj aglomeritaj en cimento” (malfacile digestebla!). Tia petro, malgraŭ facilanimaj vortaristoj, kiuj baptas ĝin pudingo, devus nomiĝi „konglomeraĵo” (aŭ eble „psamito”).

Nia PIV, kiu ĉe mi vere ne ŝimiĝas en la libroŝranko, diras ke „pudingo” estas „deserta plado, miksaĵo el faruno, ovoj, graso, sukero, boligita en pelvo, bakita aŭ vaporkuiritaj”. Trafas min, ke ankaŭ en tiu ĉi difino mankas iom da likvo, laŭ mi. Tamen do, nepre estas klare, ke la ĉefingredienco ne estas lakto! Iom stran-

ga estas ankaŭ la pudingujo, la pelvo, kiu en sia propra difino tute ne eksplicite mencias sian apartenon al la kuireja ilaro! Por mi pudingo troviĝas inter flaŭno kaj torto spongeca, rilate firmecon de konsisto, do precipe la rolon de lakto. Pudingo pli libere moviĝas ol sponga torto, eĉ ol babao, iomete kiel ventro de gaja dikulo, kiam li ridas.

Konklude: temas pri tuta familio de falsaj amikoj, pri tuta falsa amikaro! Estus logike, ke esperantistoj, en sia vortuzo, restu ĉe la PIV-a difino! Prefere oni uzu la vorton „pudingo” do por deserto, kies ĉefa ingredienco estas faruno kaj kiu prepariĝas en muldilo kaj ne iĝas firma torto. La pladoj, „falsaj pudingoj”, kies ĉefa ingredienco estas lakto, estu nomitaj „flaŭnoj”. Atentu! Ne kaptiĝu en la reton de alia falsa amiko, nome „flano”, ĉar ĝi estas tre vasta nocio laŭ PIV: „ĉiu plata, maldika, rondforma bakaĵo el pasto”. Kion mi komprenis (kaj nederlande komprenas) sub „pudingo”, nepre en Esperanto estas „vanila flaŭno”. Por la tre nutrigaj nedolĉaj pladoj kun ĉefa ingredienco iu viandaĵo oni povas uzi ekzemple „(banboligita) miksopoto” ... Avantaĝo estas, ke oni esprimos sin pli klare, eĉ se ankoraŭ multaj diversaj manĝaĵoj grupiĝos sub unu sola nomo.

Ĉu nun pro tiu malklareco ni devos „sidi en sakaĵoj sub cindro” kaj pensi, ke nia lingvo malsukcesis pro manko de precizeco? Ne! Tute ne! La ebleco esprimi sin malprecize, malklare estas nepra karakterizo de ĉiu nacia lingvo kaj devas nepre ekzisti ankaŭ en Esperanto! Pensu jam pri la vortoj „afero”, „aĵo”, „io”. Ili estas la plej ekstremaj vortigoj de malprecizeco, sed tamen absolute ne malhaveblaj en iu ajn lingvo. La vorto „pudingo” do estas, eĉ laŭ sia PIV-a difino, kolektiva vorto (kolektivovorto), kiu indikas multajn diversajn aferojn, kiujn oni povas precizigi per pli malvastaj vortoj aŭ per aldonaj adjektivoj. Ilustre sekvu la tradukoj, kiujn mi proponas por la 70 pudingoj de Escoffier. En la libro ĉiu el ili nomiĝas „pudingo”, sed mi ŝanĝis la nomojn de tiuj, kiuj ne respondas al la esperanta signifo de „pudingo”. Se vi deziras la receptojn, konsultu la li-



Vanila flaŭno kun fruktoj kaj glaciaĵo.


bron (*La kuirlibro de la klasika kuirado*) en via lingvo, ĉar sendube ĝi estas tradukita en ĉiujn seriozajn lingvojn (krom unu).

Amela rizpudingo, Amerika pudingo, Arenberga pudingo, Bohema pudingo, Bova pudingo angla, Bovaĵa pudingo, Bovaĵ-bovrena pudingo, Bovaĵ-ostra pudingo, Brazila pudingo, Buduarbiskvitpudingo, Ĉokolada rizpudingo, Diplomatapudingo, Elfregina pudingo, Fromaĝa panpudingo, Frukta diplomatapudingo, Fruktopudingo angla, Glaciaĵpudingo, Griopudingo, Griopudingo angla, Griopudingo krema, Jorkŝirpudingo, Kabinetpudingo, Kastria pudingo, Klermonta pudingo, Kolbasetpudingo angla: Angla kolbasetmikspoto bolbana, Krema rizpudingo: Krema rizkaĉo, Krempudingo: Krema flaŭno, Kustardpudingo, Malakova pu-

dingo, Malvarma pudingo, Mari-Roza pudingo, Medolpudingo, Migdala angla pudingo, Migdala pudingo, Miramarpudingo, Muslinpudingo, Neselroda pudingo, Nudelpudingo freŝa, Panpudingo, Panpudingo angla, Panpudingo franca, Panpudingo skota, Pizopudingo, Pompudingo, Prunpudingo angla, Rizia pudingo, Rizpudingo, Rizpudingo angla, Rolia pudingo, Sagupudingo angla, Sagupudingo, Saksa pudingo, Saksona ŝaŭmpudingo, Sejmurpudingo, Sufleo hinda, Sufleo kaŝtana, Sufleo kun citrono, Sufleo laŭ Denizo, Sufleo likvora, Sufleo reĝa, Sufleo reĝina, Sufleo regnestra, Sufleo senzorga, Sufleo vezuvia, Ŝafpudingo, Tapiokopudingo angla, Tapiokopudingo, Varma gria pudingo, Vermiĉelpudingo.

Petro De SMET'

Mallumo en bengala nokto



Pri la libro mem

Prave la kovrildorsa teksto asertas: „Jen libro aparte taŭga por la serio Oriento-Okcidento. Ĝi temas pri konflikto inter orientaj kaj okcidentaj kulturoj, religioj, kutimoj, tabuoj, vivstiloj – fine, homoj.”

Por mi, kiel teologo, la aŭtoro dum multe da jaroj estis nur grandulo pri kompara religi-scienco, precipe je la

kampo de la mitologio. Ke li estis ankaŭ bona roman-aŭtoro, lin faras pli homa.

En la libro certa Allan (rolulo, kiu svage kamuflas la junan studenton Mircea mem) iras al Hindlando (la nomo en la romano), kie li ekloĝas en hejmo de loka altkasta inĝeniero, kiu havas filinon 16-jaran, Maitreyi.

La libro rakontas al ni, ke pliposte la *mi*-persono, Allan, foliumadas siajn notlibretojn, siajn skatolojn kun restaĵoj el tiu iama tempo, dum iom post iom, rakontante al ni, li retravivas la tutan malfeliĉan amhistorion: en la komenco li apenaŭ interesiĝis pri tiu tre juna „negrino”, kiun li eĉ portretas unue kiel rekte ne allogan, ne vere belan, kaj malrapide li fariĝas kvazaŭ sorĉe allogata kaj kuntrenata de sia amo al ŝi. Li montras, kiel inteligenta kaj alte edukita ŝi estas; sed ankaŭ la kulturajn diferencojn, la problemojn, kiuj klare kaj netransireble malhelpas, ke iam ajn ili formu paron akceptitan/akcepteblan de la ĉirkaŭo. Li sen beligado montras siajn proprajn tipe eŭropajn (ĉu orientalistajn?) antaŭjuĝojn, kiuj evitigas kompreni ŝian veran fonon. Sufiĉe ŝokis min, kiel li kontrastigas inter „ni civilizitoj” kaj „ili” (p. 120) – kvazaŭ ĝuste Barato ne estus landego (vera subkontinento) kun kulturo giganta – kaj kiel ŝian religian fonon li priskribas kiel „ĝangalo da superstiĉoj”, kiam ŝi parolas

pri „la ritmo, la karmo, la prauloj.” (p. 128). Mi intelektu ja sciis, ke longtempe eŭropanoj supozis sian kulturon certe pli granda, pli serioza, pli kultura ol tiun de kiu ajn alia mondomarto – sed ĝuste ĉe tiel fama religi-sciencisto tian antaŭjuĝon ne tiel klare mi estis atendinta.

Se oni legas la romanon nur kiel tian – kaj ĝi ja prezentas sin kiel romanon – ĝi certe estas ege bona kaj intereskapta. La familio, kie gastas Allan, fariĝas sufiĉe viva: precipe la gepatroj kaj Maitreyi mem estas indaj personoj. Kiam montriĝas, ke Allan kun Maitreyi kvazaŭ paktis ian sekretan „fianĉiĝon” – pere de mistike simbola ringo – la familia larĝmenseco montriĝas, tamen, havi klarajn limojn: la saman tagon la eŭropa junulo estas forigata el la domo. Li foriru. Tio, certe, en la frua 20a jarcento, laŭ mi, apenaŭ alie povus malvolviĝi. Ankoraŭ nun en multe da medioj estus neimag-eble, ke junulo adolta havu sekretan amligitecon kun filino 16jara (eĉ senkonsidere pri eventuala seksa plenumiĝo).

Pri la ĉirkaŭo de la libro

La libron malfermas enkonduko de Probal Daŝgupto. Li atentigis pri la bengallingvaj frazoj per kiuj – kvazaŭ moto – komenciĝas la verko mem. Feliĉe, li ilin ankaŭ tradukas. Danke al tiuj frazoj, la libro fariĝas kvazaŭ ia teksto rekte direktita al la originala Maitreyi – do la origina bengala junulino, ekster la romano. Literature verko ja iamaniere, ĉar estante literature verko, estas iel memstara disde la ĉiutaga realeco. Sed per ĉi frazoj, Mircea sin kvazaŭ direktas al Maitreyi. Oni povas demandi sin, kial? Kaj kial nur bengallingve – sen ajna klarigo, ankaŭ en plurlingvaj naciaj tradukoj.

La moto diras: „Ĉu vi memoras, Maitreyi? Se jes, ĉu vi povas pardoni?” Tio pensigas, ke iel li sin sentis kulpas. Se la romanon nur kiel romanon oni legas, ne ŝajnas esti kialo por tio. Do devas esti io, kion ni, eksteruloj, ne scias.

La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL,

Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.
Tlf. + 32 3 234 34 00;
tlk. + 32 3 233 54 33;
rete: retbutiko@retbutiko.net;
skajpe fel-monato

aŭ per www.retbutiko.net.



Ege interese estas, ke poste mi eksciis el la dua enkonduko, tiu de Constantin Cubleșan, ke ankaŭ Maitreyi Devi mem verkis romanon pri la sama amhistorio: *Ĝi ne mortos*. El anglalingva eseo de Ginu Kamani en la reto mi eksciis, ke pli ol 40 jarojn post la apero de l' origina romano de Mircea Eliade, Maitreyi eksciis pri ĝia ekzisto; ŝi vojaĝis al Usono, kie tiutempe li laboris ĉe universitato, ekserĉis lin, parolis kun li kaj devigis lin promesi, ke almenaŭ dum ŝia vivo ne aperos angla traduko de tiu lia romano. Ŝi ja sentis sin ege vundita – laŭ ŝi, li donis en la libro pri ŝi tute ne ĝustan bildon. Ĉu tio ĉi estas objektive vera aŭ ne, miasupozes apenaŭ gravas plu – post tiom da tempo. Sed lia romano aperis en pluraj eŭropaj lingvoj, tamen dumlonge ne angle. Oni do povas supozi, ke en Barato lia romano dumlonge ne estis legata – kiu ja legis tie la francan aŭ, ekzemple, la germanan? Aliflanke, *ŝia* romano en sia hejmlando havis grandan sukceson; ja eĉ kondukis al serio da prelegoj ŝiaj – antaŭ granda publiko. Ŝi mem fariĝis plurlibra aŭtoro kun bona sukceso, ŝajnas.

Kiel ajn: la kulturaj interfrapiĝoj, kiuj jam videblas en la romano de Mircea, estis daŭrigataj ekster la pure literatura forumo. Estus, certe, interese plu legi ...

Pri la traduko

Oni povas nur laŭdi Ionel Oneț, eĉ ne vidinte la originalon. La libro legiĝas kiel bonstila romano originala. Nur eblas bedaŭreti, ke (ankoraŭ? – ĉu venos?) ne ekzistas Esperanto-traduko de la koncerna verko de Maitreyi Devi. Sed kiel ajn: jam ĉi tiu verkaĵo sola meritas la plenan atenton. Ĝi fascinas.

Gerrit BERVELING

Mircea Eliade: *Fraŭlino Maitreyi*. Tradukis el la rumana Ionel Oneț. Serio Oriento-Okcidento 43. Eld. Bero, Rotterdam, 2007. 200 paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 15 eŭroj + afranko.


Popularsciencaj kaj socikritikaj artikoloj

Alberto Fernández estas bone konata esperantista aŭtoro, kies artikoloj pri popularsciencaj temoj, kaj aliaj socikritikaj, delonge aperas en la esperanta gazetaro. Li klare kaj facilkompreneble verkas. Ĉi tiu libro konsistas el kolekto de ĉirkaŭ kvindek da liaj artikoloj (inkluzive unu recenzon kaj du poemojn).

La prisciencaj verkoj estas originalaj, la socikritikaj plejparte konsistas el tradukaĵoj liaj. Senescepte ili interesas. La sociaj vidpunktoj liaj plejparte koniĝas per lia elekto de artikoloj. La ĉefa temfadenado, trairanta ilin, estas socialismo; kaj plurfoje li akre kritikas la sinproklamintan „demokration” usonan kaj ĝian aliancanon Britio. Ĉi tiuj parolas ĉefe pri la mondpolitiko de Usono kaj ĝia ŝtatprezidanto George Bush; kaj pri la imperiisma nacipolitiko usona, kiu sin maskas per pretendo alporti demokratiecon al granda parto de la mondo. Kompreneble Irako estas akre pridiskutita, sed ankaŭ la kaŝita ekonomidomina celo (bone konata kaj ne nur socialiste bazita kritiko!).

La libro estas dividita en du preskaŭ egalajn partojn. La unua artikolo, kiu celas klarigi la religi-filozofion de Teilhard de Chardin, estas tre klare verkita, kaj pensinstiga. Malofte mi vidis simile klaran, simpatian kaj celtrafan faskon de 14 paĝoj da traktado pri unu el la ĉefpensuloj de la dua duono de la dudeka jarcento.

Aliaj temoj, pri subatomaj partikloj kaj la naturo de materio; prognozoj pri la estonta utiligo de komputiloj; la kuraca efiko de placeboj (jes, ja! tre firme bazita diskuto pri farmakologie malakceptata observo); jen nur kelkaj el la artikol(et)oj, verkitaj de laiko por laiko, ankoraŭ atentindaj.



Kiel priskribi la amason da artikoloj en la dua parto de la libro, dediĉita al kontraŭkapitalisma, socialisma diskutaro? Plej imponis al mi la prelego pri „La ideologia stumblo inter Socialismo kaj (la) Internacia Lingvo”: kial Esperanto estis malakceptita de reĝimoj, kiuj proklamis sin socialismaj? Alia valora artikolo titoliĝas „Kiam du kanajloj intertraktas”: la interrilato de diktatoro Franco kaj Adolf Hitler (en tiu renkontiĝo, Hitler malgajnis!).

Ne ĉiam la leganto centprocente partoprenas la vidpunkton de la artikoloj. Pro tio, la libro vere rekomendindas. Leginto, ne instigita plu pripensadi, estas neimagebla.

Donald BROADRIBB

Alberto Fernández: *Kalejdoskopio rememoro*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, 2007. 215 paĝoj kudritaj. ISBN: 978 90 77066 34 8.

Prezo ĉe FEL: 15 eŭroj + afranko.

Ne persekutu la hebreojn

En la jaro 1146 Bernardo de Clairvaux [klervó] apoge disvastigis la anoncon de la dua krucmilito, proklamita de papo Eŭgeno la 3a, invitante aliĝi al ĝi. Lia forta zorgo estis proklami ĉiufanken kaj ĉiurimede, ke la entrepreno neniel implicas persekuton kontraŭ hebreoj: „Ili estu nek mortigitaj, nek forigitaj.” Li rapidis, interalie, al la rejnlandaj regionoj, kie jam komenciĝis mortigado de hebreoj. Li konvinkis episkopojn protekti hebreojn, eventuale loĝigante ilin eĉ en katedraloj, kaj sukcesis disigi parton de la popolo de ribelaj monaĥoj, kiuj surstrate kaj surplace predikis, ke ĝis kiam plu ekzistos hebreoj, „tiuj mortigintoj de Kristo”, la kristanoj malvenkos en la Sankta Tero. Li bremsis, eĉ fizike, la monaĥon Rodolfon, kiu influe instigis al malamo.

Pri tio oni parolis dum tritaga kunveno organizita en Romo de la centro pri studoj cisterciaj. La temo de la kolokvo estis *Bernardo de Clairvaux: aktualeco de liaj mesaĝo kaj sperto*. Eble ĉio limiĝus al memorigo kaj laŭdado de rafinita verkisto, poeto, mistikulo, filozofo-teologo kaj konsilanto de papoj kaj regantoj, se en tiu ĉi kolokvo ne estus partoprenintaj ankaŭ kelkaj hebreaj kulturitaj homoj kun rabenoj kiel „ne lastaj interesitoj”. Utilas raportoj pri la komento de rabeno Jozefo Laras, en kiu estas citataj kelkaj leteroj de Bernardo de la jaro 1146, precipe letero 365a, kie estas proklamata la „senescepta malpermeso mortigi aŭ elhejmigi hebreojn”. Li tion subtenis, kiel diris Laras, „apogante sin sur bibliaj tekstoj kaj per rezonadoj ja tiepoke efikaj, sed certe hodiaŭ iom malpli akcepteblaj eĉ inter kristanoj”. Pro kiu kialo ne persekuti la hebreojn?



Kaj sankta Bernardo diris: „Ne persekutu la hebreojn.”

„Bernardo”, plu diras Laras, „reprenas moticon, kiu jam estis motivo de Sankta Aŭgusteno kaj kiu plurfoje estis uzata de bremsantoj de la persekutoj kontraŭ hebreoj. Laŭ Aŭgusteno, la hebrea popolo per la krimo ĉesis esti la popolo de dio (sur ĉi tiu popolo, laŭ Aŭgusteno, do pezis la kulpo de la mortigo de Kristo). Sed se la hebreoj daŭre plu vivas ĉiulande en la mondo, tio signifas, ke dio ĝuste tion volas: ili estas la *vivanta pruvo* de la fundateco de kristanismo.”

Restas, laŭ la rabeno, la demando, kiun eble ĝis nun neniu povis respondi: ĉu Bernardo vere estis konvinkita pri la aŭgustena tezo aŭ ĉu li uzis tian argumenton nur por garantii la savon de hebreoj? „Sed”, estis lia fina komento, „tiu, kiu, kiel mi, suferis persekuton, scias, ke ĉiu parolo aŭ ago, kiu vere helpas, ja estas savankro. Bernardo per forto, kuraĝo kaj decidemo devigis Rodolfon reeninigigi la spadon.”

Armando ZECCHIN

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por fami-liaj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelego programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Natu-rista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!

Esperantistaj foto- kaj filmamatoroj, vizitu www.ipernity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj ver-koj? Aŭ ĉu vi preferas liston de difinita aŭtoro, ekzemple de la verkoj de Jorge Camacho aŭ de Sikosek? Eble vi volas nur scii, kiu estas la aŭtorino de *La ŝtona urbo*? Ĉio tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvin-foje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

27 EUR

30 USD

aŭ egalvaloro

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6587

LA GAZETO

**MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA**

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO – 55210 CREUE (Francio)

Komencanto

"Komencanto"

Estas internacia dumonata revuo por lernemaj, verkemaj, iniciatemaj esperantistoj. Interesaj homoj, freŝaj ideoj, praktikaj rezultoj, belaj bildoj, spiritaj humuraĵoj ...

retpoŝto: komencanto@r66.ru
provizora retpaĝo:
www.komencanto.narod.ru

Poŝta adreso:
KOMENCANTO,
pk 132, Ekaterinburg,
620041 Rusio

Abontarifo: 15 eŭroj
Aerpoŝta aldono + 2 eŭroj.
Abonu ĉe UEA aŭ
ĉe via landa peranto

Regule aperas ekde 1998
Formato A4, 16 paĝoj

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo: 20,00 EUR + aŭfranko

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:

Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

Rete: www.retbutiko.net - retbutiko@fel.esperanto.be